

& Funebra kanto al la memoro de grafo L. N. Tolstoj:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 350 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Osveta Lidu, 1910 novembre 22-an) kaj el ĉeĥa tradukis (Aŭtunaj floroj, 1912). Baladigis Martin Strid (2016) per disduigo na strofoj kaj novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

(/so mimi lala mimi soso somi; so mimi lala mimi soso somi;

(#Rekantaĵe: re dore mi; mi do rere dodo Ti La; re dore mi i)

)×14)+

(&Strofoj:

'1 /De sensignifa rusa Astopovo ; trans land' kaj maro flugas stranga movo.

(×: **Sub la tili' ; ploro gutu, floron ŝutu ; sub la tili'.**)

'2 Li, kiu tiom amis mondon tutan, ; ĵus finis vojon sian, grandan, krutan.

'3 Ne sonos en preĝejoj sonoriloj, ; nur homaj koroj ploros, centoj, miloj,

'4 kaj oni sen kantado kaj sen preĝo ; en tombon metos lin laŭ pastra leĝo.

'5 La simplan ĉerkon sekvos granda aro ; kaj ploro korŝiranta nun sen baro

'6 ĉielan flugos el la kor' de l' gento, ; al kiu apartenis lia sento.

'7 Sed via ploro estos nur blasfemo. ; Lin gardos eklezia anatemo

'8 Kaj de la tombo vin kun viaj larmoj ; forpelos poste eble la ĝendarmoj.

'9 Ho, povas plori vi popolo muta, ; en hejmo lia kaj en mondo tuta

'10 sur tomb' de homo nobla, granda, ĉasta, ; de rusaj landoj ĝis la maro vasta.

'11 Ho, multefoje en la historio ; similan stelon eklumigis Dio;

'12 ĝi brilis nokte kiel la juvelo, ; sed ĉiam malaperis de ĉielo,

'13 Kaj ĉiam la fabelo sin ripetis. ; Vi ree ŝarĝon vian trenis, ĵetis

'14 kaj atendadis ree sen murmuro ; ĉu nova stel' aperas en lazuro.)